http://www.radio-frei.de/?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1494180000

5. Mai 2017

Die Presse

Poŝtelefono und Tekokomputilo

Plansprachen sollen die internationale Verständigung verbessern. Rund 500 sind dokumentiert, die einzige voll ausgebildete ist Esperanto.

Die UNESCO hat 1954 anerkannt, dass die Errungenschaften von Esperanto mit ihren Zielen und Idealen übereinstimmen, und rief 1985 ihre Mitgliedsstaaten und internationale Organisationen auf, den Esperanto-Unterricht in Schulen und seinen Gebrauch in internationalen Angelegenheiten voranzutreiben.

<http://diepresse.com/home/bildung/weiterbildung/5212901/>

Postelefono-und-Tekokomputilo

4. Mai 2017

Frankfurter Allgemeine

Wer spricht heute noch Esperanto?

Ludwik Zamenhof hat das „Esperanto“ erfunden. Vor 100 Jahren ist er gestorben. Wie steht es derzeit um seine Sprachschöpfung? FAZ.NET hat sich für Sie auf die Suche gemacht.

Zur Abwechslung mal ein gut recherchierter, interessanter und frischer Artikel über Esperanto, der nicht aus irgendwelchen anderen Veröffentlichungen zum wiederholten Male abgeschrieben wurde. Lesenswert

<http://www.faz.net/aktuell/gesellschaft/menschen/wer-spricht-heute-noch-esperanto-14992045.html>

4. Mai 2017

Neue Deister-Zeitung – NDZ.de

Die „Ratkaptista Bando“ (Rattenfänger-Schar) wurde nach einem Esperanto-Intensiv-Wochenendkurs 1987 ins Leben gerufen. Und diese 30 Jahre sollen 2017 auch besonders gefeiert werden!

http://www.ndz.de/startseite_artikel,-wortgewandt-ins-jubeljahr-_arid,2368685.html

4. Mai 2017

Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern

Esperantowelle

<http://www.mmv-mediathek.de/play/21601-esperanto-welle.html>

29. April 2017

Otto Nelken spricht über Esperanto

Seitdem durch das Wirken des früheren Lehrers Josef König in seinem Heimatort zehn Esperanto-Lokalitäten entstanden waren, ist Stockum nach dem „Esperanto-Jahr“ 2010 mit seiner besonderen „Esperanto-Woche“, einem Esperanto-Landeskongress, einer Esperanto-Ausstellung und zahlreichen Veranstaltungen zu Ehren des Golddorfs und der Sprache aus seinem rund 40-jährigen Dornröschenschlaf in Sachen Esperanto erwacht

Leider war der Termin bereits am 3. Mai.

<http://www.wp.de/staedte/arnsberg/otto-nelken-spricht-ueber-esperanto-id210402459.html>

21. April 2017

Badische Zeitung

Keineswegs eine kühle und abweisende Sprache

Zu: "Wir sind die Guten", Beitrag von Martin Halter (Kultur, 12. April):

<http://www.badische-zeitung.de/leserbrieft-68/keineswegs-eine-kuehle-und-abweisende-sprache--135874921.html>

19. April 2017

Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern

Esperantowelle, 60 Minuten

<http://www.mmv-mediathek.de/play/21365-esperanto-welle.html>

19. April 2017

Stadtradio Göttingen

Die Gilsa-Glosse... Adel verpflichtet! - „Esperanto-Stadt Herzberg“

Detlev von Gilsa, versucht hier auf Kosten von Herzberg und Esperanto "witzigen Geist" zu versprühen, stellt dabei aber eigentlich seine Ahnungslosigkeit unter Beweis.

http://www.stadtradio-goettingen.de/beitraege/serien/gilsa_glosse/die_gilsa_glosse_adel_verpflichtet___esperanto_stadt_herzberg/index_ger.html

<http://www.podcast.de/episode/320007325/Die+Gilsa-Glosse...+Adel+verpflichtet%21+-+%E2%80%9EEsperanto-Stadt+Herzberg%E2%80%9C/>

19. April 2017

Lausitzer Rundschau

Ehre für Erfinder der Sprache ohne Land

Mit Esperanto wollte Ludwik Zamenhof eine leicht erlernbare Sprache entwickeln, um Konflikte zwischen den Menschen zu vermeiden. Esperantisten haben dieser Tage an den Erfinder "ihrer" Sprache erinnert.

<http://www.lr-online.de/nachrichten/brandenburg/Ehre-fuer-Erfinder-der-Sprache-ohne-Land;art310462,5947680>

18. April 2017

Kalenderblatt

22. April 1922 – Erste Esperanto-Konferenz

Prag, es herrscht Aufbruchstimmung bei den 3.000 Teilnehmern des "Universala Kongreso" - des Esperanto-Weltkongresses. Seit dem Ende des Ersten Weltkriegs erlebt die Sprachbewegung einen Boom: Tausende Menschen strömen in Esperanto-Kurse, zahlreiche Schulen setzen die Sprache auf den Lehrplan.

http://www.kalenderblatt.de/index.php?what=thmanu&lang=de&manu_id=492&sdt=20170418&maca=de-podcast_kalenderblatt-1086-xml-mrss

18. April 2017

Bergedorfer Zeitung

Klaus Friese kämpft für Esperanto. Er schreibt über die Sprache, die als besonders leicht erlernbar gilt. Mit 68 Jahren hat er sein erstes Buch über Esperanto veröffentlicht.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "Bergedorfer Zeitung 2017.04.18")

18. April 2017

Deutsche Welle – Kalenderblatt

Sprache verbindet: Am 18. April 1922 forderten Delegierte aus 28 Ländern auf der ersten internationalen Esperanto-Konferenz, diese Kunstsprache an Schulen zu unterrichten.

Ziel: Das Zusammenwachsen Europas zu fördern.

<https://player.fm/series/kalenderblatt-deutsche-welle-50830/1841922-erste-esperanto-konferenz-6avvZbPKPrG2lS83>

18. April 2017

Neues Deutschland

Wochen-Chronik:

18. April 1922

In Genf findet eine internationale Konferenz für den Esperanto-Unterricht statt. Die Delegierten aus 28 Ländern fordern, die Kunstsprache zum Aufbau eines friedlichen Europas einzusetzen.

<https://www.neues-deutschland.de/artikel/1048085.wochen-chronik.html>

17. April 2017

Bürgermagazin Pfaffenhofen an der Ilm

Jahresversammlung des Esperanto-Sprachklubs Pfaffenhofen

<http://www.pafunddu.de/pfaffenhofen/kultur/jahresversammlung-des-esperanto-sprachklubs-pfaffenhofen-d10177.html>

17. April 2017

Dill-Post

Esperanto in Herzberg am Harz

Feierliche Einweihung des Zamenhofplatzes in Herzberg am Harz am Samstag den 8. April unter musikalischer Begleitung des Esperanto-Chores aus Halle.

http://www.mittelhessen.de/lokales/region-dillenburg/leserreporter-region-dillenburg_artikel,-Esperanto-in-Herzberg-am-Harz-_arid,919859.html

17. April 2017

tagesschau.de

200 Jahre Neutral Moresnet - Ein staatenloses Stück Torte

Es war einmal ein Niemandsland irgendwo zwischen Aachen und Eupen. Ohne Justiz oder Schulpflicht, aber mit Fahne und Briefmarke. Neutral-Moresnet - ein 3,4 Quadratkilometer kleines staatenloses Gebiet in Form eines Tortenstücks. Ein Historiker hat seine Geschichte aufgeschrieben.

Von Ralph Sina, ARD-Studio Brüssel

<http://www.tagesschau.de/ausland/neutral-moresnet-101.html>

17. April 2017

Dill-Post

Feierliche Einweihung des Zamenhofplatzes in Herzberg am Harz am 08.04.2017

http://www.mittelhessen.de/lokales/region-dillenburg/leserreporter-region-dillenburg_artikel,-Esperanto-in-Herzberg-am-Harz-_arid,919859.html

12. April 2017

WAZ

Esperanto ist in aller Munde im Kettwiger Jugendhaus

Dort fand die 33. Internationale Frühlingswoche des Deutschen Esperanto-Bundes statt.

"China veröffentlicht täglich Nachrichten in Esperanto, Facebook gibt es in Esperanto, Google Translate bietet Esperanto-Übersetzungen an. Jedes Jahr werden über hundert Bücher veröffentlicht, auch die Zahl der Musik-CDs wächst. Für Louis v. Wunsch-Rolshoven widerlegt dies sämtliche Kritiker, die diese Weltsprache in spe verteufeln wollen: „Verbote und gezielte Falschinformation sollten und sollen Esperanto verhindern."

<https://www.waz.de/staedte/essen/kettwig-und-werden/esperanto-ist-in-aller-munde-im-kettwiger-jugendhaus-id210233037.html>

12. April 2017

Badische Zeitung

Wer war Esperanto-Erfinder Ludwik Zamenhof?

Glanz und Elend einer am Reißbrett erfundenen Sprache:

Vor hundert Jahren ist der Esperanto-Erfinder Ludwik Zamenhof gestorben. Eine Würdigung seines Werks.

Leider ohne Registrierung zur teilweise lesbar

<https://www.badische-zeitung.de/wer-war-esperanto-erfinder-ludwik-zamenhof-135599669.html>

10. April 2017

Stadtradio Göttingen

Herzberg ehrt den „Esperanto“-Begründer Ludwig Zamenhof

Seit elf Jahren nennt sich Herzberg „Esperanto-Centro“, Esperanto-Stadt. Die so genannte Brückensprache mit der einfachen Grammatik und dem übersichtlichen Wortschatz wird hier gefördert und auch unterrichtet. Zum 100. Todestag des Esperanto-Begründers Ludwik Zamenhof

wurde ein Platz nach ihm benannt, wo Zamenhof als Förderer der internationalen Verständigung bereits mit einem Denkmal geehrt wurde. Dem Esperanto-Begründer widmet sich auch eine Sonderausstellung im Herzberger Schlossmuseum, die ebenfalls am Wochenende eröffnet wurde. Aus Herzberg berichtet Tina Fibiger in einem knapp vierminütigen Beitrag.

http://www.stadtradio-goettingen.de/beitraege/kultur/herzberg_ehrt_den_esperanto_begruender_ludwig_zamenhof/index_ges.html

10. April 2017

GZlive8. April 2017

Herzberg würdigt Esperanto-Erfinder

Zum 100. Todestag von Ludwik Zamenhof ist in Herzberg am Harz am Samstag ein Platz nach dem Erfinder der Sprache Esperanto benannt worden.

<http://live.goslar.de/post/view/58eaf901f8231efa4d0abb74>

9. April 2017

Deutsche Welle

in spanischer Sprache

<http://www.dw.com/es/alemania-homenajear%C3%A1-a-creador-del-esperanto/a-38357164>

8. April 2017

NDR.de

Herzberg benennt Platz nach Esperanto-Erfinder

"Den ewigen Traum vom harmonischen Miteinander aller Menschen auf der Welt - auch Ludwik Zamenhof hat ihn geträumt. Damit sich Menschen jeder Muttersprache verstehen können, erfand er eine möglichst leicht erlernbare gemeinsame Sprache: Esperanto."

http://www.ndr.de/nachrichten/niedersachsen/braunschweig_harz_goettingen/Herzberg-benennt-Platz-nach-Esperanto-Erfinder,esperanto120.html

8. April 2017

Hamburger Abendblatt

Herzberg benennt Platz nach Esperanto Erfinder

Mit der Benennung eines Platzes ehrt Herzberg am Harz den Erfinder der Sprache Esperanto, Ludwik Zamenhof. Anlass ist der 100. Todestag am 14. April.

<http://www.abendblatt.de/region/niedersachsen/article210199537/Herzberg-benennt-Platz-nach-Esperanto-Erfinder.html>

Welt

<https://www.welt.de/regionales/niedersachsen/article163530721/Herzberg-benennt-Platz-nach-Esperanto-Erfinder.html>

BILD

<http://www.bild.de/regional/aktuelles/niedersachsen/herzberg-benennt-platz-nach-esperantoerfinder-51210174.bild.html>

Focus

http://www.focus.de/regional/niedersachsen/sprache/herzberg-benennt-platz-nach-esperanto-erfinder_id_6920647.html

Arcor

http://www.arcor.de/content/aktuell/regional_news/niedersachsen/5775039,1,Sprache-Herzberg-benennt-Platz-nach-Esperanto-Erfinder,content.html

Elbe-Jeetzel-Zeitung

http://www.ejz.de/ejz_14_111301489-1-Herzberg-benennt-Platz-nach-Esperanto-Erfinder.html

Neue Presse

<http://www.neuepresse.de/Nachrichten/Niedersachsen/Uebersicht/Herzberg-benennt-Platz-nach-Esperanto-Erfinder>

7. April 2017

Zamenhof.life

Ein ausführlicher und Lesenswerter Artikel zum Hundertsten Todestag von Ludwik Zamenhof am 14. April 2017

<http://zamenhof.life/de/>

6. April 2017

Kultürlich

Deutsche Esperantojugend

Interview mit Michaela Stegmaier, der Vorsitzenden der Deutschen Esperantojugend.

<http://www.kultuürlich.de/4065-deutsche-esperanto-jugend/>

6. April 2017

Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern

Esporantowelle, 60 Minuten

<http://www.mmv-mediathek.de/play/21364-esperanto-welle.html>

4. April 2017

Junge Welt

Rotlicht:Esperanto

"Als internationale Sprache ist Esperanto heute längst von anderen Sprachen abgelöst worden, etwa den vor allem unter Jugendlichen beliebten sogenannten Emoji, Bildschriftzeichen, die per SMS oder Messengerdiensten verschickt werden können. Zwar bleiben hier Missverständnisse aufgrund verschiedener kultureller Codes nicht aus. Die kleinen Zeichen sind dennoch auf dem Vormarsch. Sogar der erste Roman, Herman Melvilles »Moby Dick«, ist unter dem Titel »Emoji Dick« bereits auf Emoji erschienen."

<https://www.jungewelt.de/artikel/308508.rotlicht-esperanto.html>

3. April 2017

Hannoversche Allgemeine

Erstes Büro für Übersetzungen eröffnet

Kein Ort weit und breit ist so international geprägt wie der Airport. Da könnte sich die Geschäftsidee von Vardanush Gevorgyan als Erfolgsmodell erweisen: die gebürtige Armenierin hat zwischen Last-Minute-Schaltern das erste Übersetzungsbüro des Flughafens eröffnet - im Angebot hat sie 50 Sprachen. Im Angebot: u. a. Esperanto und Dänisch, Tschetschenisch und Tigrinya.

<http://www.haz.de/Hannover/Aus-der-Stadt/Uebersicht/Am-Hannover-Airport-eroeffnet-mit-der-Zweitstelle-der-Agentur-Sprachkultur-das-erste-Uebersetzungsbuero>

2. April 2017

Freier Rundfunk Erfurt International e.V

Esperanto und Erfurt passen gut zusammen: "radio-frei.de" will die Vielfalt der Landeshauptstadt der ganzen Welt in der internationalen Sprache präsentieren. Beiträge in Deutsch und Esperanto
http://www.radio-frei.de/?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1491156000

23. März 2017

Harzkurier

Ungarische Kultur im Mittelpunkt

Herzberg Esperanto-Centro veranstaltet regelmäßig „Interkulturelle Abende“.

Das Esperanto-Centro in Herzberg organisiert in Zusammenarbeit mit der LEB einmal monatlich einen „Interkulturellen Abend“ über verschiedene Themen in deutscher Sprache. In der vergangenen Woche wurde aus Anlass des Ungarischen Nationalfeiertages in das Interkulturelle Zentrum eingeladen. ...

<http://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article210020453/Ungarische-Kultur-im-Mittelpunkt.html>

Das Lesen des ganzen Artikels ist kostenpflichtig.

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "Ungarische Kultur 23.03.2017")

20. März 2017

Microsoft

kostenloses Wörterbuch Deutsch Esperanto

Für PC oder mobiles Gerät

ab Windows 10

<https://www.microsoft.com/de-at/store/p/worterbuch-deutsch-esperanto/9nvtvj9lw4qz#>

18. März 2017

ipernity

Per la angla lingvo usona kaj brita imperioj sklavigis la mondon

de Zlatko Tišlar

<http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko/4654750?t=90934&c=1&s=edit>

17. März 2017

dailymotion.com

Video mit Peter Zilvar: ESPERANTO • Lektion 3

Sind Sie für Völkerverständigung und den Weltfrieden? ... Haben Sie schon Esperanto gelernt? ... Esperanto wird Ihr Leben verändern! ... Sprachen reißen Barrieren ein und schlagen Brücken zu anderen Menschen! ...

<https://www.dailymotion.com/video/x5ds57x>

17. März 2017

Verein Deutsche Sprache, Infobrief 2017/11

Esperanto erfährt Zuwachs

"Während weltweit immer mehr Sprachen bedroht sind, verbreitet sich die Kunstsprache Esperanto stetig."

<http://vds-ev.de/infobriefe2017#esperanto>

16. März 2017

Amikumu

Finde Esperantosprecher in Deiner Umgebung

<https://amikumu.com/eo/>



Kvin jarkolektoj de *La Ondo de Esperanto* libere legeblaj

Antaŭ dek jaroj, en januaro 2007, komencis aperi la elektronika versio (pdf) de la “*La Ondo de Esperanto*”. La redakcio post paso de kvin jaroj publikigas la malnovajn jarkolektojn. Estis enretigitaj la pdf-versioj de ĉiuj numeroj de la 2011-a jaro, kaj nun kvin jarkolektoj de “*La Ondo*” (2007-2011) estas libere elŝuteblaj kaj legeblaj ĉe:

<http://esperanto-ondo.ru/Lode-old.htm> (<http://sezonoj.ru>)



Jarraporto de Edukado.net




Edukado.net estas retpaĝaro pri instruado de Esperanto. Ĝi celas ĉefe kunlaboradon inter Esperanto-instruistoj, sed estas ankaŭ helpilo por memlernantoj. La paĝaro estis lanĉita en 2001


kaj renovigita en 2005. Ĝi estas prizorgata de Katalin Kováts kaj subtenata de Esperantic Studies Foundation. Enhavas la retejo i.a. instrumaterialon, katalogon kun recenzoj de Esperanto-lernolibroj, specimenojn de internaciaj kaj naciaj Esperanto-ekzamenoj, korespondan servon, forumon kaj la retan ludon RISKO. La publikan version de la jarraporto vi povas elŝuti en la dokumentujo: <http://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=272>

Jubilea, 150-a numero de *Juna Amiko* aperis

Juna Amiko estas internacia Esperanta revuo por lernejoj kaj komencantoj, eldonata de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) ekde 1972. La nuna ĉefredaktoro estas Stano Marček. Ekde la jaro 1987 la revuo aperas ĉiujare kvarfoje (februare, aprile, septembro kaj novembro). La gazeto celas precipe tiujn, kiuj jam konas la fundamenton de Esperanto, sed ne trovas legaĵojn en Esperanto kiel eble plej facilajn. Sen piednotoj la revuo uzas nur 1500 vortojn, la plej oftajn. I.a. en la jubilea numero: El la artikolo “*Juna Amiko jubileas!*”



oni ekscias pri la historio de *Juna Amiko* kaj pri ĝiaj redaktoroj. Frontpaĝojn de ĉiuj 150 numeroj troveblas sur la kovriloj de la revuo. Numeroj de *Juna Amiko* malpli novaj ol unu jaron elŝuteblas en pdf-formato: www.eventoj.hul/juna-amiko/. Ĉiujn 150 numerojn de *Juna Amiko* en pdf-formato eblas mendi sur DVD: <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9461>



Ateliero pri Esperanto en Brazilo

La 1-an de marto 2017 Legio de Bona Volo, partnere kun Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP), sukcese fondis senpagan atelieron pri Esperanto en la ĉefurbo San-Paŭlo, Brazilo. La celo estis vekti la intereson de la ne-esperantista loka komunumo lerni la lingvon internacian. La partoprenintoj havis la okazon enskribiĝi en ĉeesta baza kurso de Esperanto, proponata de EASP.

(Maria Aparecida da Silva, www.bonavolo.com,

www.paivanetto.com/leo)



Per nostalgia kontraŭ WhatsApp k.a.



Malgraŭ nuntempa komunikado, kiu plej ofte funkcias per poŝtelefonoj kaj komputiloj, unu malnova, analoga skribmedio ankoraŭ estas uzata ankaŭ de la junularo: la poŝtkarto.

Dum leteroj preskaŭ ne plu estas sendataj, proksimume 250.000.000 poŝtkartoj atingis la adresitojn en Germanio dum la jaro 2014. Ĵurnalistino Cathrin Schmiegel esploris tiun seninterrompan sukceson kaj opinias, ke la kialo estas la daŭra pluevoluigo de la poŝtkarto, kiu same kiel la vestaĵmodo adaptiĝas al la modernaj stiloj.

(sueddeutsche.de; (VDS-Infobrief, <http://rundbrief.vds-ev.de>)

Poemoj de Julio Baghy

Antaŭ 50 jaroj, la 18-an de marto 1967, en Budapeŝto mortis Gyula “Julio” Baghy (1891–1967), elstara hungara esperantisto, instruisto, verkisto, aktoro kaj movadano, kunredaktoro de *Literatura Mondo*, aŭtoro de pluraj libroj. Je la 50 mortodatreveno de “Paĉjo” en la novaĵretejo *La Balta Ondo* aperis kvar liaj popularaj poemoj kaj novelo.

(<http://sezonoj.ru/2017/03/baghy-2/>)



TEJO en Turkio


Fine de februaro en Istanbul la prezidanto de TEJO Michael Boris Mandirola, la instruisto Özdizdar Murat kaj Vasil Kadifeli prezentis Esperanton al grupo de neesperantistoj, nomita “Gejunuloj de la klavaro”. Tio okazis en renkontiĝo de junaj komputilistoj pri sekureco en la komputila kaj interreta kampo. La organizanto Ziyahan Albeniz iomete

lernis Esperanton kaj invitis la triopon montri la lingvon al tiu preskaŭ 50-persona grupo. La prezento daŭris unu horon kaj kelkaj el la partoprenantoj interesiĝis. Vasil skizis mal-longe la historion, Murat prezentis la lingvon mem kaj parolis pri siaj travivaĵoj en Esperantujo, kaj Michael Boris Mandirola parolis pri TEJO, IJK kaj kion ili faras en la mondo. Fine ili respondis al la demandoj de la grupo.



(Revuo Esperanto, uea.org)

ILEI pretigas sin por Unesko oktobre



ILEI refoje partoprenos aktive en la dujara Ĝenerala Kunsido de Unesko en Parizo. Tiucele ĝi aktualigas la informilon uzitan antaŭ du jaroj. Nova celo estas disponi je ĝi en ĉiuj lingvoj de UN. La rezulto: “Jen miraklo de nia lingvo, de nia komunumo kaj de tekniko: Ene de 24 horoj ni sukcesis akiri tekstojn en tri pliaj lingvoj por nova eldono de la dulingvaj varbiloj pri ILEI en Esperanto, plus la

angla, franca, hispana, araba, rusa kaj ĉina. Ciferoj estas aktualigitaj kaj aldoniĝis la loko por la ligaj kongresoj ĝis 2017. Krome la informilo havas tradukojn por la rumana, dana, turka, indonezia, finna, itala kaj portugala. Nun naskiĝas la ideo krei version en la korea, uzeblan en la juliaj kongresoj. (Revuo Esperanto, uea.org)

Kubo: Raporto pri 6-a KERo 2017

De la 15-a ĝis la 19-a de marto 2017 okazis la 6-a tutlanda renkontiĝo KERo, en la centra provinco Villa Clara, en la feriejo Rito Seibabo. La renkontiĝon ĉeestis 115 geesperantistoj el la tuta lando. La programo de KERo estis sub la devizo



Esperanto kaj packulturo en la Zamenhof-Jaro; okazis seminario pri Informado, ateliero pri kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon, paroligaj kursoj, bazaj kaj mezaj ekzamenoj de KEA, kunsido de la ILEI-sekcio, kunsido pri Zamenhof-Jaro, literatura rondo, elŝutejo, radioamatoroj, ekskurso al historia loko ĉe la montoĉeno Escambray. La vesperaj aranĝoj inkluzivis prezenton de dokumenta filmo pri la grupo Amindaj kaj la urbo Contramaestre, oni spektis la muzikvideon Teorevoj en Amo-taso, konkursanta en Teo kaj Amo, la internacia konkurso de Ĉina Radio Internacia. Cetere okazis ankaŭ kantado, deklamoj, teatraĵo, ĉina artdanco, koncerto kaj balo.

(Maritza Gutiérrez; Yahoo-grupo Landa agado)

TEJO partoprenis en Tutmonda Festivalo de Ideoj por Daŭripova Evoluo

TEJO partoprenis en Tutmonda Festivalo de Ideoj por Daŭripova Evoluo, organizitan de Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazis de la 1-a ĝis la 3-a de marto en Bonno, Germanio. La evento celis pridiskuti la plej taŭgajn kaj efikajn kialojn atingi la 17 daŭripovajn celojn en la 2030-a Tutmonda Tagordo de Unuiĝintaj Nacioj. Pli da informoj legeblas sur la retejo.

(TEJO Aktuale, www.tejo.org)



La Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo skanas kaj publikigas korespondaĵojn de Ludoviko Zamenhof

Okaze de la 100-a morto-datreveno de Ludoviko Zamenhof oni skanis kaj publikigis 19 originalajn korespondaĵojn de Ludoviko Zamenhof. Ili estas libere kaj senpage legeblaj sur la retejo de la Esperantomuzeo kaj de la Kolekto por Planlingvoj. Leteroj de Ludoviko Zamenhof: www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/arkivajoj/ (Bernhard Tuidler, www.onb.ac.at/museum/esperantomuseum/)



Komuna legado

Nova tendenco el Britio, nun ankaŭ en Germanio, disvastiĝas: "Komuna legado" jam trovas signifan plaĉon de interesitoj en Berlino kaj Frankfurturto. Organizitaj estas la renkontiĝoj de du berlinaj kulturperantoj: Thomas Böhm kaj Carsten Sommerfeldt. La temo de "komuna legado" estas preparoli tekston komune en grupo kaj trovi kunligojn kun la propra vivo, konduto kaj sentoj. Brita studo jam pruvis, ke la komuna legado plibonigas bonfarton kaj kapablon de komunikado.

(focus.de, VDS-Infobrief, <http://rundbrief.vds-ev.de>)



Mankoj en lernejoj

"Ni estas survoje al respubliko de analfabetoj", titoligis la ĵurnalistino Hildegard Strausberg sian artikolon en la gazeto "Die Welt", en kiu ŝi kritikas malbonan ortografian scion de germanaj studentoj de universitatoj kaj altlernejoj. Kialon por tio ŝi vidas en tro faciliga didaktiko de multaj instruistoj, precipe la kulmino estus la "skribado laŭ aŭskultado". Sciencistino Ute Frevert avertas ne malaltigi la nivelon en germanaj lernejoj. Pro la celo ebligi al kiel eble plej multaj lernejoj la abiturientiĝon, oni reduktas la postulojn. Cetere pli kaj pli forfalas instrueroj pro malsana pedagogo, sed sen taŭga anstataŭa lernigo.

(welt.de, deutschlandfunk.de, correctiv.org, VDS-Infobrief, <http://rundbrief.vds-ev.de>)



Aperis la unua Heroldo por 2017



Aperis la unua numero de "Heroldo de Esperanto" por la jarkolekto 2017. La originala plano de la Sociala Grupo Lexus, kiu pasintjare aĉetis "Heroldon" de LF-koop, estas eldoni 20-paĝan gazeton, sed la unua numero estas nur 12-paĝa. Laŭ la vortoj de la

redakcia direktoro de "Heroldo", brazilano Fabricio Valle, la dua numero havos 6-paĝojn kaj ekde la tria ĝi estos 20-paĝa gazeto. La unua numero, kiu estas laŭvice № 2268, estas senpage legebla kaj elŝutebla en la reto.

(<https://heroldodeesperanto.com/>)

Pasporta Servo

Post plurjara paŭzo denove estas aĉetebla la adreslibro de Pasporta Servo en papera formo. La 15-centimetra kaj 248-paĝa libreto enhavas adresojn kaj datumojn de 974 gastigantoj en 81 landoj. La libro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA kontraŭ 9 eŭroj (+ sk) laŭ la reta katalogo <http://katalogo.uea.org?inf=3474>. Retejo de la senpaga gastiga servo Pasporta Servo estas <http://www.pasportaservo.org> (Informo de Lingvo-Studio, L.S., www.eventoj.hu) Pli da informoj troveblas ĉe: <http://tejo.org/pasporta-servo-gastiga-servo-kaj-kultura-traĵto-de-esperanto/>



Amikumu ekfunkciis

Amikumu estas plursistema aplikaĵo por saĝtelefonoj (Android kaj iOS), per kiu oni povas trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn aŭ parolantojn de aliaj lingvoj – nuntempe nur eblas trovi esperantistojn. La aplikaĵo funkcias dumaniere. Oni povas trovi proksimajn esperantistojn per listo aŭ per mapo. La aplikaĵo lanĉiĝis por esperantistoj la 22-an de aprilo 2017. Post kreo de konto oni povas vidi la 100 plej proksimajn esperantistojn apud vi. Richard Delamore, la ĉefa afergvida oficisto, respondis al demandoj de la redakcio de *La Ondo de Esperanto*; la intervjuo estas legebla en la novaĵretejo *La Balta Ondo*: <http://sezonoj.ru/2017/04/amikumu-4/> (<https://amikumu.com>)



Gazetara kampanjo por la Zamenhof-Jaro kaj nova retejo pri Zamenhof

En novembro 2016 UEA realigis konkurson por krei novan paĝaron pri la Zamenhof-Jaro. La Estraro akceptis la proponon de Guillem Sevilla, magistro pri tipografio, profesia reteja dezajnisto kaj enpaĝigisto el Barcelono. La paĝaro www.zamenhof.life havas ampleksan enhavon pri la vivo kaj verko de Zamenhof en Esperanto kaj informojn por la ekstera publiko en pli ol 30 lingvoj. Krom tiu plurlingva paĝaro estas ankaŭ la paĝo www.gazetaro.org/ por kolekti kaj montri eventojn aŭ aperintajn artikolojn pri la Zamenhof-Jaro sur mapo,



kalendario kaj blogo. La Estraro de UEA decidis ankaŭ pri speciala gazetara kampanjo okaze de la “Zamenhof-Jaro”. La celo estas informi plejeble multajn gazetojn, radiostaciojn, televidstaciojn, retpaĝojn aŭ blogojn pri Zamenhof kaj Esperanto. Per la helpo de kunlaborantoj, la asocio sendis pli ol 3 mil mesaĝojn al komunikiloj en pluraj landoj. La aŭspicio de Unesko al la solenaĵo portas grandan oportunon por kapti la atenton de la amaskomunikiloj.

(Emilio Cid, Martin Schäffer, www.uea.org)

Nova libro „Fahrtrichtung Esperanto“ (Veturdirekto Esperanto)

La libro aperis en la germana lingvo en aprilo 2017 ĉe Allsprachendienst Esperanto GmbH, en kunlaboro kun Svisa Esperanto-Societo kaj la aŭtoro Klaus Frieze. La libro estu ne malhavebla gvidlibro por ĉiu aktivulo, kiu deziras realigi sian vizion, kreante inciaton kaj agadgrupon. La libro tion montru per la ekzemplo de Esperanto, sed ĝiaj instruoj utilu por iu ajn asocicela aktiveco, sendepende ĉu ĝi estas religia, kultura aŭ politika. La libro enhavas kontribuojn de Robert Bogenschneider, Ralph Glomp, Jan Kozousek, Helmut Lasarczyk, Frank Merla, Werner Pfennig, Mireille Grosjean, Dietrich Michael Weidmann kaj Louis v. Wunsch-Rolshoven. Pliaj informoj pri la eldona programo de Allsprachendienst Esperanto GmbH sub: <http://allsprachendienst.ch/esperanto/eldonejo.html>.

(<http://informejo.com/fahrtrichtung-esperanto--veturdirekto-esperanto.html>)

Pri kio ridis Zamenhof

Redaktante la unuan Esperantan gazeton “La Esperantisto”, Ludoviko Zamenhof prizorgis ankaŭ la rubrikon “Bagateloj”. Evidente li aperigis en ĝi tiujn ŝercojn kaj anekdotojn, kiujn li mem ŝatis. Halina Gorecka elektis kaj aperigis etan kolekton de Zamenhofaj ŝercoj en la februara kaj aprila numeroj de “La Ondo de Esperanto”. Hodiaŭ, danke al la publikigo en la

novaĵretejo “La Balta Ondo”, ĉiu deziranto povas ekscii, pri kio ridis la tridekelk-jara Doktoro Esperanto en la foraj jaroj 1890-aj. (<http://sezonoj.ru/2017/04/zamenhof-19/>)

Bavario: Virtuala ekspozicio pri Zamenhof

La Bavaria Ŝtata Biblioteko anoncis la oficialan lanĉon de la ellaborita virtuala ekspozicio pri Zamenhof; la retejo nun estas en la germana. La biblioteko jam delonge planis tion kaj nun demonstras kiajn valorojn ili havas en la arkivo danke al la donaco de gesinjoroj Hauptenthal. Rigardo kaj pludonado de la adreso estas rekomendinda, ĉar la biblioteko kontrolas kiom da alklakoj la paŝaro ricevos. Ligilo: <https://www.bsb-muenchen.de/article/virtuelle-ausstellung-ueber-esperanto-schoepfer-zamenhof-1788/> (Informo de Karl el Germering, informado@yahoo.com)



Esperanto en Afriko n-ro 30



Aperis la 30-a numero de la bulteno “Esperanto en Afriko”. Tiu unua numero de la jaro 2017 raportas pri la unua IJK en Afriko, la urbo de la IJK, impresoj de kelkaj partoprenintoj de la 6-a AKE de UEA, konkurso de ILEI pri la busana kongreso, agadoj de la Afrika Komisiono, de la benina, burunda, kameruna, konga, senegala, tanzania kaj togolanda asocioj kaj laste pri la forpaso de s-ro Ferdinand Kinkani. Ligilo al la bulteno: <http://www.esperanto-afriko.org/Esperanto%20en%20Afriko%20n-ro%2030-1.pdf>

(Adjévi, Yahoo-grupo Landa agado)

UEA havos novan retpaĝon kaj administran sistemon

Post la retejoj www.esperanto.net, www.aktivulo.net, www.zamenhof.life kaj www.revuoesperanto.org la laboroj fokusigos al la novaj administra sistemo, membrospaco kaj la retejo de UEA. La laboron faros Esperanta teamo kun merkataktisto, dezajnisto kaj komputilistoj, gvidata de Ana Maria da Costa Ribeiro. La nova sistemo kreigos en pluraj fazoj, unue la aspekto estos renovigita kun emfazo de kreado de hejmostilo,

poste la libroserva retejo, kaj fine la membropsaco kaj la administra sistemo. La tuta laboro antaŭvideble daŭros ankaŭ en 2018. Konsiloj, sugestoj estas tre bonvenaj al novaretejo@co.uea.org, aŭ en la forumo ĉe forumo.esperanto.net.

(www.uea.org)

Esperanto kaj la internacia sindikata movado



Eric Lee (LabourStart) informis: “Ni scias, ke Esperanto povas esti potenca ilo por plibonigi la komunikadon, transporti la kulturajn apartigojn kaj lukti por mondo pli pacema kaj justa. Sed ĉiuj homoj ne scias tion, kaj en la internacia sindikata movado Esperanto plu estas nekonata. Ju pli la sindikatoj komunikas trans la landlimoj kaj kune aktivas kadre de tutmondiĝo, des pli Esperanto povas esti tre utila. La Esperanta movado devas trovi rimedojn por interesi la sindikatanon al la internacia lingvo. LabourStart povas helpi. LabourStart estas la retpaĝaro pri novaĵoj kaj kampanjoj de la internacia sindikata movado, bazita en Londono kaj fondita en 1998. Ties 135.000 subtenantoj regule kampanjas por apogi la laboristajn rajtojn (kaj pli larĝe la homajn rajtojn) pere de siaj retkampanjoj. Tiuj kampanjoj aperas en trideko da lingvoj, inkluzive en tiuj, kiujn oni bezonas, kiel la angla, franca, hispana kaj germana. Sed ili ĉiam aperas ankaŭ en Esperanto. Ĉar niaj sindikataj partneroj rigardas la rezultojn de niaj klopodoj, ili rimarkas la lingvon Esperanto, kiun plej ofte ili ne konas. Por pruvi la utilecon de Esperanto, por montri ke ĝi estas vivanta lingvo, parolata ĉie en la mondo, helpus, se multe pli da esperantistoj subtenus niajn kampanjojn.”

(<http://leo.labourstart.org>)

Pola parlamento honoris Zamenhofon



Dum sia kunsido la 7-an de aprilo 2017 Sejmo de Pollando per aklamo alprenis la decidon pri rememorigo de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto, respektante liajn meritojn kaj atingojn. Necesas rememorigi, ke la 12-an de decembro 2016 Urba Konsilio de Bjalistoko rifuzis la proponon nomi la jaron 2017 Jaro de Zamenhof. En januaro 2016 la konsilianoj de alia pola urbo, Słupsk, alprenis tiun decidon. Ĉiuj datrevenaj eventoj okazas sub aŭspicioj de Unesko. Pli da informo en raporto de Eŭropa Bulteno.

(<http://www.europa.eu/eo/europa-bulteno>)

La ludo RISKO fariĝis 4-jara

Pere de la ludo oni povas lerni pri la Esperanto-movado, kulturo kaj lingvo. En tiu 4-jara tempoperiodo aliĝis al la interreta ludo 874 personoj el 67 landoj. Kiel plej ofte, ankaŭ en tio francoj estas la plej multnombraj, ili estas 135. Ludis jam pli ol 1000 tagojn 30 personoj. En la monato aprilo 2017 ludis 108 riskemuloj, inter ili 14 novaj ludantoj.

Gajnis la ĉi-monatan ludon Eŭgeno Liĉaŭka el Pollando.

(<http://edukado.net/novajhoj?id=697>)



TEJO kolektis pli ol 21 mil eŭrojn por venigi junajn afrikanojn al la 1-a IJK en Afriko

Antaŭ kelkaj monatoj TEJO lanĉis la kampanjon “Ni realigu la unuan IJK-n en Afriko!” per kiu ĝi celis kolekti rimedojn por propra kontribuo al la projekto AEJK – afrika-eŭropa junulara kapabligho kaj por venigi junajn aktivuloj el aliaj afrikaj landoj, kiuj ne partoprenas en la projekto. Danke al malavereco de esperantistoj TEJO sukcesis kolekti pli ol 21 mil eŭrojn, kio



ebligos igi la unuan Internacian Junularan Kongreson en Afriko vere afrika. Konstante funkcias ankaŭ retejo de la IJK en Aneho, pere de kiu eblas aliĝi al la kongreso.

(www.tejo.org, <http://sezonoj.ru/>)

Nova retejo de E@I pri Zamenhof

La centjara datreveno de la morto de L. Zamenhof estas bona okazo por rememori ĉi tiun neordinaran homon, kiu havis interesan vivon kaj nekutiman filozofion. Por tio aperis la retejo zamenhof.info. Krome, la 26-an de julio ni festos la 130-jariĝon de la apero de la unua lernolibro de Esperanto. Do plia taŭga jubileo por speciala retejo, dediĉita al Zamenhof. Bedaŭrinde, nun por vasta publiko la nomo Zamenhof (ofte ankaŭ la vorto Esperanto) signifas nenion. Eĉ esperantistoj ofte ne povas multon rakonti pri la doktoro Zamenhof, pri liaj ideoj, vivo kaj agado. Do la ĉefa celo de la retejo estas prezenti lin, lian laboron, verkaron kaj filozofion al tiuj, kiuj nebone (aŭ tute ne) konas lin.



Granda pluso de la retejo estas ĝia multlingveco, danke al kiu eblas prezenti Zamenhofon al neesperantistoj.

(Ilja Gnušarev, Peter Baláž, *La Balta Ondo*
<http://sezonoj.ru/2017/05/zamenhof-20>)

Multlingveco influas kreopovon

Ju pli da lingvoj la homo scipovas, des pli bona estas lia aŭ ŝia kognita kapablaro. Tion asertas la brita sciencistino Gabrielle Hogan-Brun.

Laŭ ŝi multlingveco povas kaŭzi pli bonan atenton, inteligentecon kaj pli bonajn vortan kaj spacan kapablojn.

Eĉ kompreniĝemo estus pli evoluigita kaj ankaŭ la kapablo trovi solvojn.

Gabrielle Hogan-Brun klarigas tion per ŝanĝoj de la sinapsaro kaj densiĝo de la cerba lingvocentro. Plie ŝi mencias, ke lingvolernado povas – kiel ekzemple ludoj kun cerbumado – stimuli la cerbon, same kiel ekzerci muskolan. Multlingveco ne nur plibonigas la proprajn kapablojn, sed ĝi ankaŭ subtenas la lingvan diversecon: mondlingvoj kiel ekzemple la angla kaj la hispana pli kaj pli forpremas malgrandajn lingvojn.

(ze.tt, science.orf.at, idw-online.de, studium.at)
(VDS-Infobrief, <http://rundbrief.vds-ev.de>)



(Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher)

Luminesk' 2017

La tria Luminesk' okazos de la 27-a de decembro 2017 ĝis la 3-a de januaro 2018 en Haltern am See (poŝtkodo 45721) en la suda monastera lando. Nia kongresejo estas seminardomo de la katolik-sindikata movado „KAB“ sur la monteto Annaberg en arbaro apud Haltern am See. La kongresejo estas sufiĉe komforta. Ni loĝos en dultaj ĉambroj je preskaŭ hotela nivelo kun banĉambro en ĉiuj ĉambroj.

En la organiza teamo ĉi-jare denove estos Alfred Schubert por la tema programo; temajn programojn bonvolu sendi al temaprogramo@luminesk.de. Yoshie kaj Dieter Kleemann feliĉe ofertas gufujon. Sebastian Kirf subtenos pri teknikaj aferoj.

Mi tre ĝojas, ke Barbara Brandenburg ofertis sian helpon por Luminesk' dum la Germana Esperanto-Kongreso en Freiburg. Pliajn informojn troviĝos en la retpaĝo www.luminesk.de

La organiza teamo decidis ŝanĝi la daton je unu tago: la tria Luminesk' okazos de la 27-a de decembro ĝis la 3-a de

januaro. Ni havis la imagon, ke tiu dato estas pli konvena al la deziroj de la partoprenantoj.

Se vi deziras havi paperan informilon aŭ aliajn informojn, ne hezitu kontakti la organizantojn telefone per senkosta numero 0800 3 36 36 642 (ene de Germanujo).



Finanzordnung des "Deutscher Esperanto- Bund e. V." vom 3.6.2017

§ 1 Geltungsbereich

Die Finanzordnung regelt die Haushalts- und Wirtschaftsführung des Vereins "Deutscher Esperanto-Bund e. V.".

